

Heinrich Heine,
En nord' unu pino

*tradukita de Ludwig Lazarus
Zamenhof*

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵo;
Glacia kaj neĝa tavolo
Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Ĝi songas, ke palmo gracia,
En unu dezert' orienta,
Eterne pri lando alia
Malgaje sopiras silenta.

*Traduko de la Germana poemo
"Ein Fichtenbaum steht einsam"
de HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 - †1856-02-17) en Esperanton
de LUDWIG LAZARUS ZAMEN-
HOF (Ludoviko Lazaro Zamenho-
fo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-1023-2073 (2014-05-23
14:27:37)*

*Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko
troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.*

Heinrich Heine,
En nord' unu pino
en solo

*tradukita de Ludwig Lazarus
Zamenhof*

Iomete sanĝita versio

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵo;
Glacio kaj neĝa tavolo
Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Ĝi songas, ke palmo gracia
Ĝi estas en orient',
Eterne pri lando alia
Sopiras ĝi en silent'.

*Traduko de la Germana poemo
"Ein Fichtenbaum steht einsam"
de HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 - †1856-02-17) en Esperanton
de LUDWIG LAZARUS ZAMEN-
HOF (Ludoviko Lazaro Zamenho-
fo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-1023-2074 (2014-05-23
14:39:50)*

*Mi, Manfred Retzlaff, aliĝis en
2014-05-23 la Zamenhofan tradu-
kon tiel, ke la rim-skemo estas la
sama kiel en la germana origina-
lo.*

Heinrich Heine,
Pinarbo staras sola

tradukita de Friedrich Pillath

Pinarbo staras sola
En nordo sur nuda altaĵo.
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio
Ĝin kovras blanka litaj'.

Songadas ĝi pri palmo
Ĝemanta en orient',
Soleca, sur arda deklivo
En maldolĉega silent'.

*Traduko de la Germana poemo
"Ein Fichtenbaum steht einsam"
de HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 - †1856-02-17) en Esperanton
de FRIEDRICH PILLATH (†1932-
04.03).*

*Arg-1023-2287 (2015-03-19
16:43:44)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi,
Manfred Retzlaff, trovis en
<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html>.*